
# La NASKa Fasko

**Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE**

sabaton, la 8-an de Julio, 2017 • numero kvin

## Hodiaŭ

- ★ **7:15 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj
- ★ **12:30 ptm:** Tagmanĝo
- ★ **2:00 – 3:00 ptm:** Laborsesio de KTF: **Koruso**
  *Flowe 110*
- ★ **3:15:** Duncan CHARTERS prelegos pri **"Esperanto kaj humanismo"**
  *Flowe 110*
- ★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **7:00 – 8:00 ptm:** Tomaso ALEXANDER rakontos pri **"Miaj plej hontigaj historioj el Esperantujo"**
  *Flowe 110*
- ★ **8:00 ptm:** Laborsesio de KTF: **Instrumentistoj**
  *Flowe 110*



# Ludu per ŝnuretoj

*de Kathryn "Katjo" PRENTICE*



Mi instruos kiel fari leion (Havajan kolĉenon) dimanĉe je la 2a. La metodo estas tre simpla afero, tre populara kun la infanoj de Havajo, daŭros eble 10 minutojn, kaj bezonas neniujn apartajn ilojn krom viaj fingroj kaj lanfadenon, kiun mi kunportos (la lanfadenon - vi kunportu viajn proprajn fingrojn!).

Se vi interesiĝas pro tio, bonvolu sciigi min per *Facebook*, per tekstmesaĝo (ĉe +01-xxx-xxx-xxxx), aŭ persone antaŭ ol la 3a hodiaŭ. Tiel mi scios kiom da lanfadeno mi devas akiri.

Post la leifarado, se vi interesiĝas pri trikado, mi montros pligrandigitan terminaron pri trikado kaj petos vian helpon plibonigi ĝin, kaj ankaŭ montros recepton por triki ĉapelon laŭ la standardo de Esperantujo.




# Rimoj kaj Proverboj

*de Makis*

Eble vi estas legema, verkema, aŭ nur scivolema. Ne gravas, kia vi estas – mi estas certa, ke povas esti utilaj al vi du retpaĝoj, kiujn mi kreis dum la pasinta jaro.
La unua estas:

**www.rimaroesperanta.com**

*La Rimaro Esperanta* estas ankaŭ konata kiel "rima vortaro" aŭ "inversa vortaro". En ĉi tia vortaro, la vortoj estas listigitaj inverse - t.e. unue la lasta litero, poste la antaŭlasta, k.t.p.




Pro ĉi tio, estas facile trovi vortojn kiuj rimiĝas. Hura!

La dua estas:

**www.proverboj.com**

*La Proverbaro Esperanta* estas tiu verko, kiun ĉiu devus jam koni. Se vi ne konas ĝin, (vi kompatindulo), nia kara Zamĉjo tradukis pli ol 2600 proverbojn, kaj kreis la *Proverbaron*. Oni povas trovi gemojn kiel "ĵeti perlojn antaŭ la porkojn" aŭ "kio estas lernita, ne estas perdita".

Ankaŭ ekzistas nova eldono de la *Proverbaro*, kiu estas aĉetebla de Amazon.com. En la libro, ĉiu proverbo estas listigita plurfoje laŭ la vortoj en la proverbo. Ekzemple, la proverbo "Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn" troveblas en tri lokoj: sub la "Ĵ" sekcio ("Ĵeti") kaj sub la "P" sekcio ("perlo" kaj "porko"). Tiel vi povas trovi viajn plej ŝatatajn proverbojn esperantajn – eĉ se vi memoras nur unu vorton.

# La angulo de la verkemulo: La magia balailo

*de Jorge Rafael ("Rafa") NOGUERAS*

*Ne forgesu, ke ankaŭ vi povas verki mallongan rakonton, uzante unu el la frazoj en la Fasko de hieraŭ.*

Barbro, dekdujara knabino, promenis tra la arbaro, feliĉe fajfante, ĉar ŝia vivo estis gaja kaj senzorga. "Kia bela tago!" ŝi pensis. "La suno brilas kaj la vento susuras tra la arboj kaj mi ne havas hejmtaskojn!"

Subite, olda kaj hida virino aperis el malantaŭ arbo kaj alparolis la knabinon: "Saluton, karulino! Kiel vi?" Barbro sciis ke ŝi ne parolu kun stranguloj, sed ŝi estis ĝentila kaj bonkonduta infano, do ŝi respondis: "Mi fartas bone, sinjorino, kaj vi?"

La maljunulino alpaŝis Barbron kaj diris: "Vi estas ŝaĝa knabino, ĉu ne? Mi povas vidi tion. Do, mi eĉ ne provu trompi vin: mi estas sorĉistino. Mi ankaŭ antaŭsentas ke vi estas ĝentila kaj bonkonduta infano, ĉu ne? Mi volas rekompenci vin pro via boneco. Ĉu vi eble volus uzi mian magian balailon?"

Barbro sciis ke ŝi devis ne akcepti la proponon fare de la stranga virino, sed, kiel infano povus nei tian oferton, kia flugi sur magia balailo? Ŝi ekscitite diris: "Jes, ja!", kaj la sorĉistino tuj ridegis plengorĝe kaj kriĉis al la knabino: "Jen mia magia balailo! Tamen, sciu ke vi ne uzos ĝin por flugi, sed por balai mian tutan domon!"

La kompatinda Barbro ne povis liberigi sin de la balailo (ĝi ja estis magia!), kaj ŝi estis devigita pasigi la tutan tagon purigante la ege kotplenan domaĉon de la sorĉistino. Tial la knabino komprenis kial oni ĉiam diru "ne", kiam sorĉistino demandas: "Ĉu vi volas uzi mian magian balailon?"

# Esperanto kaj humanismo

*Jen resumo de la prelego, kiun D-ro Duncan CHARTERS prezentos hodiaŭ.*

Ĉu formo de humanismo ĉiam estis esenca elemento de Esperanto kiel lingvo kaj movado? Surbaze de la evoluo de konceptoj kiel "interna ideo", "hilelismo" kaj "homaranismo", ĉu ni povas hodiaŭ koncepti, apogi kaj disvastigi ideologion bazitan sur universalaj etikaj valoroj?

# Pri la ŝanhaja lingvo

*de Andrew XU*

Kiam oni parolas pri la ĉina lingvo, tiu lingvo vere rilatas al grupo da lingvoj. La plejmulto de homoj opinias, ke tiuj estas dialektoj. Sed mi, persono kiu kreskis parolante la ŝanhajan, ne konsentas.

La ŝanhaja, au 上海话, estas la dialekto en la urbo Ŝanhajo. La ŝanhaja estas parto de la vua lingvo , kiu konsistas el multaj dialektoj.

Jen frazo ekzempla kun la mandarena kaj Esperanto.

- La mandarena: 上海话很好玩！
  (**Shàng hǎi huà hěn hǎo wán**)
- La ŝanhaja: 上海闲话老好孛相！
  (**zɑ̃.hɛ ɦɛ.ɦo lɔ hɔ bəʔ.ɕjɑ̃**)
  (**zang he e u lao hao be xiang**)
- Esperanto: La ŝanhaja estas amuza!

Se vi volas aŭdi tiujn frazojn, petu al mi, kaj mi diros por vi.

# Viaj vortoj gravas!

*de Alex (Alekso) MILLER*



Saluton al ĉiuj! Dum mi verkas la trian libron pri Kapitano Katarino, mi petas de vi konsilon. Mi ne estas profesia reklamisto aŭ bazarulo kaj mi ne scias la plej bonajn rimedojn por vendi aŭ reklami ion ajn, inkluzive de libroj. Se vi havas sugestojn por mi pri bonaj vendokazoj aŭ homoj kiuj verŝajne ŝatus librojn pri pirato alergia je gluteno, bonvole informu min per CaptainKatiePirate@gmail.com. Mi ankaŭ ŝategus viziti vin en fremdaj regionoj kaj prezenti la librojn tie.

Aldone, ne forgesu, ke se vi verkos kaj enmetos etan recenzon de unu el miaj infanlibroj en Amazon.com, mi hazarde elektos unu el tiuj recenzantoj por ricevi senpagan ekzempleron je la fino de NASK. Fakte, vi ne devas aĉeti ekzempleron por recenzi ĝin tie do estas tute senkosta afero. Tiuj recenzoj tre helpas min allogi aĉetontojn rete do mi antaŭdankas vin pro tio!

Ĉion bonan, Alex (Alekso) MILLER




*Sylvain rolas kiel "nevo" en skeĉo pri la programo "Ekparolu!"*